

Pour des raisons techniques, le site complet n'est provisoirement plus disponible.  
En attendant le rétablissement du service, voici quelques informations nouvelles.

La « Zamenoffesto » à ostende de ce dimanche 07 décembre 2014 a répondu aux attentes des participants. Jen kelkaj fotoj kaj informoj.



## Zamenhofa festo en Oostende 7/12/2014, (Marcel Delforge)

Okazis en la marborda urbo de Belgio, la tradicia jarfina festo, bone organizita de gijaj aktivaj klubanoj , cefe Flory kaj Walter, Mark , Germain, Else, kaj aliaj...

Pluraj dekoj da esperantistoj el multaj partoj de la lando alvenis : Bruĝo, Gento, Bruselo, Ellezelles, Kelmis, Verviers, Lieĝo, Karloregio ( Charleroi) kaj kompreneble, Ostendo. Estis granda okazo por rekonatiĝi kun multaj samideanoj, post kelkaj jaroj.

La Organizantoj regalis nin kun bongusta bufedo, marfruktoj, blank-ruĝvino kaj gastronomia kuko.

Estis anonco pri ILEI baldaŭa Kongreso en Ostende 2015.

Oni ankaŭ kantis la Eŭropan himnon, kaj diversajn kantojn el multaj lokoj de la lando : Het Europees volkslied, Pays de Charleroi , Li biabouquet el Namuro, ktp.

La tago pasis tiel rapide ke , kun granda bedaŭro, ni devis tuj rehejmiĝi ....





07/12/2014



Walter







La presidento Marc Cuffez bonvenas la partoprenantojn, faras kelkajn anoncojn, kaj legas verkon de Germain Pirlot.

**Skribita per Germain Pirlot, legita per Marc Cuffez :**  
**"Pregho al Sankta Ludoviko". Germain verkis ĝin antaŭ kvar jaroj !**



## Preĝo al Sankta Ludoviko


En tiu magia tago de la Zamenhofnasko mi humile genuiĝas sub Via respektoplena ikono, Ho, ege Sankta Ludoviko, por honorigi Vian surteriĝon kaj servomiene peti Vian benon.

Tre humile mi petas Vian indulgon por ĉiuj miaj pekoj, kiujn mi faris, senkonscie aŭ nesciante, kontraŭ la « *Fundamento* » kaj la « *Ordonoj de la Akademio* » ; faru ke mi ne plu falu en tiajn erarojn.

Mi petas ankaŭ Vian grandanimecon por havigi al mi sugestojn pri la plej efika maniero disvastigi Vian mesaĝon, ne nur al miaj konatuloj, sed ankoraŭ al tiuj multnombraj malpiuloj, kiuj ignoras Vian sanktan parolon. Same mi ĝojus, se Vi povus sugesti al mi kiamaniere revenigi sur la vojon de la virto tiujn malfidulojn, kiuj eliris la verdstelitajn oazojn por senespere vagi tra la multlingvaj dezertoj.

En tiu sankta Zamenhofnasko, kiel la bibliaj paŝtistoj, mi sekvis la dian stelon por , kun aliaj ŝafistoj, digne, kvankam modeste, festi kaj laŭdi tiun neforgeseblan tagon, kiu estas gravega ĉenero en la historio de la homaro.

Germain PIRLOT



Tamen, mi bedaŭras ke maltrafas tian tagon la Magoj, kiuj, kvankam sekvante la Stelon, alvenos tro malfrue. Same mi bedaŭras ke kelkaj el ili kondukas kiel reĝetoj kaj klopodas starigi sian propran feŭdon en la verda oazo. Faru, Ho, ege Sankta Ludoviko, ke ili repaciĝu por la plej granda bono de Viaj fiduloj.

Mi restas Via fidela servanto, sed, ĉar mia misia agado restas tre, tre modesta, mi ne kuraĝas nomi min 'esperantisto', sed nur simpla 'esperanto' je la dispono de Esperanto.

Estu sanktigita, Sankta Ludoviko, Vi kiu liberigis min de la malvero, ĉar Vi estas la regado, la forto kaj la gloro eterne.

Amen !



FINO